

Saluton !

He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la [Federación Española de Esperanto](#).



Jen nova numero de la Bitbulteno de [Hispana Esperanto-Federacio](#).

#### ESPERANTO EN EL CONGRESO DE LOS DIPUTADOS

Con ocasión de la celebración en abril del Día del Libro, el Congreso de los Diputados de España (la cámara baja de las Cortes) organizó una presentación de ejemplares de traducciones del Quijote, donadas por las embajadas extranjeras en España. Tras un rápido contacto de la Federación Española de Esperanto con la biblioteca, los responsables de ésta aceptaron la donación de un ejemplar de la versión en esperanto de la famosa obra de Cervantes, e invitaron a nuestra asociación a la ceremonia.

Ésta tuvo lugar en el llamado "Salón de los Pasos Perdidos", el más solemne del Palacio de las Cortes, con discursos de la presidenta del Congreso, Ana Pastor, la presidenta de la Comisión de Cultura, y el presidente de la Real Academia de la Lengua. Puede verse la ceremonia completa en la dirección: <https://www.youtube.com/watch?v=QTMTOF-clJw>; en el minuto 10,20 la presidenta del Congreso agradece a nuestra asociación por la donación del ejemplar.

Un vídeo más corto, con un resumen, se encuentra en: <https://www.youtube.com/watch?v=3S26pdX2cM>; en el minuto 0:14 puede apreciarse cómo la presidenta hojea el libro en esperanto, lo cual tuvo lugar tras una breve conversación con el presidente de la Federación.

La donación fue incluida también en la nota de prensa del Congreso, que

#### ESPERANTO EN LA HISPANA PARLAMENTO

Okaze de la celebrado en aprilo de la Tago de la Libro, la Kongreso de Deputitoj de Hispanio (la baza leĝdona ĉambro) organizis prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de Don Quijote, donacitaj al ties Biblioteko fare de eksterlandaj ambasadoj. Post rapida kontakto de Hispana Esperanto-Federacio kun la biblioteko, la respondeculoj akceptis la donacon de ekzemplero de la versio en Esperanto de la fama verko, kaj invitis nian asocion al la ceremonio.

Tiu okazis la 20an de aprilo en la plej solena salono de la Parlamentejo (la "salono de perditaj paŝoj"), kun paroladoj de la prezidanto de la hispana Parlamento, Ana Pastor, la prezidanto de ties komisiono pri kulturo, kaj la direktoro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo. Oni povas spekti la tutan ceremonion en: <https://www.youtube.com/watch?v=QTMTOF-clJw>. En minuto 10,20 la prezidanto de la Kongreso de Deputitoj dankis nian asocion pro la donaco de la ekzemplero.

Pli mallonga video, kun resumo, troviĝas en: <https://www.youtube.com/watch?v=3S26pdX2cM>. En min. 0:14 oni vidas kiel la parlamentestro foliumas la libron kun la versio en Esperanto, kio okazis sekve al mallonga interparolo kun la prezidanto de HEF kun ŝi. Poste la parolisto mencias nian lingvon.

Krome, la Kongreso inkludis la donacadon en sia gazetarkomuniko, kio estis republikigita en diversaj ĵurnaloj la sekvan tagon.

fue recogida por varios medios de comunicación al día siguiente.



## ESPERANTO EN LA PRENSA

Como es bien sabido, este 14 de abril se cumplió el centenario del fallecimiento del Dr. Zamenhof, el iniciador del esperanto. Diversos medios de comunicación en España se hicieron eco de la conmemoración, bien republicando el comunicado de prensa enviado por la Federación Española de Esperanto, bien elaborando noticias propias o utilizando informaciones de agencia.

El más destacado fue el diario "El Mundo", que publicó un artículo de una página en la edición escrita, con titular en la portada, y con un vídeo en la versión en red, con el título "[Esperanto: utopía, orgullo y éxito](#)".

"El Faro de Vigo" elaboró un [amplio reportaje](#) sobre el esperanto en la ciudad, con entrevistas a Suso Moinhos y Antonio Valén, y otras informaciones, mientras que la vecina "La Voz de Galicia" empleó un [reportaje](#) de la agencia France Press desde Polonia, que también fue recogido en otros países.

El comunicado de HEF fue recogido tal cual en algunos pequeños medios, como "[Tercera Información](#)", [Gacetín Madrid](#) o "[El Mercurio Digital](#)".

En Público apareció una [breve noticia propia](#), así como en el vasco [Naiz](#).

El portal web "*Tribus ocultas*" de Atresmedia, editó un artículo algo más anecdótico, con el título: "[100 años de la lengua del amor](#)".

Una entrevista al presidente de HEF y a la esperantista zaragozana Beatriz Pitarch se emitió en el

## ESPERANTO EN GAZETARO

Kiel bone konate, la 14an de aprilo oni kunmemoris la centan datrevenon de la forpaso de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de nia lingvo. Diversaj amaskomunikiloj en Hispanio ehis la kunmemoron, ĉu profitante la komunikon senditan de HEF, ĉu ellaborante propran raporton, ĉu profitante informojn de novaĵagentejoj.

Jen resumoj de la aperoj en ĵurnaloj en Hispanio, okaze de la datreveno de Zamenhof:

En "El Mundo", la dua plej disvastigata ĵurnalo en Hispanio, aperis tutpaĝa artikolo kun la titolo: "[Esperanto: utopio, fiereco kaj sukceso](#)" (Esperanto: utopía, orgullo y éxito), kun malgranda alvoko en la ĉefpaĝo kaj video en la reta versio.

En "El Faro de Vigo" (ĵurnalo de la plej granda urbo de Galegio) aperis [ampleksa raporto](#), kun intervjuoj al Suso Moinhos kaj Antonio Valén.

En "La Voz de Galicia" (plej disvastigata en Galegio) aperis [versio de raporto](#) de la agentejo France Press, el Pollando, kiu aperis en multaj aliaj alilingvaj versioj kaj en aliaj komunikiloj en Ameriko.

HEF sendis gazetarkomunikon, kiu estis represita en malpli disvastigataj komunikiloj: "[Tercera Información](#)", [Gacetín Madrid](#) o "[El Mercurio Digital](#)".

En "Público" aperis [propra novaĵeto](#), kaj ankaŭ en Naiz (naciisma eŭska) ili kreis [alian artikolon](#).

En [Terra España](#) (kaj aliaj en Latinameriko), aperas informoj pri la omaĝo en Herzberg.

En socia retejo de la granda kompanio Atresmedia, "*Tribus ocultas*" ("*Kaŝitaj triboj*"), la raportistoj decidis krei iom propran ellaboraĵon, iom miksan, kun aludoj al denaskuloj kaj aliaj anekdotoj: "[100 años de la lengua del amor](#)" (100 jaroj de la lingvo de amo).

Al la kampanjo sekvis ankaŭ intervjuo pri Esperanto, kun la prezidanto de HEF kaj la zaragoza esperantisto Beatriz Pitarch, en programo "Escúchate" de regiona radio "Aragón Radio", lunde

programa "Escúchate" de "Aragón Radio", el lunes 17, que puede escucharse en la red [como podcast](#) (desde minuto 35).

Finalmente, el día 25, en la contraportada de El Heraldo, el periódico más difundido en Aragón, el artículo de contraportada lo ocupó una [entrevista con el presidente de la Federación Española de Esperanto](#) (dado que la versión en red es "premium", se puede pinchar la figura inferior para ver con más detalle)



la 17an vespere, aŭskultebbla kiel [podkasto](#) (post minuto 35).

Fine, kaj konekse kun la Hispana Kongreso en Teruelo, la plej grava ĵurnalo de Aragono, "El Heraldo de Aragón" publikigis en sia dorsopaĝo [ampleksan intervjuon](#) kun la prezidanto de la Federacio (ĉar la reta versio postulas pagon, oni povas klaki la apudan bildon por ĝin ekzameni).

## AMPLIADO EL SEGUNDO PERIODO DE ADHESIÓN AL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

El número de apuntados al Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar a finales de junio en Teruel, ya ha alcanzado [la cifra de 100](#), de una docena de países y 4 continentes, y para facilitar aún más la inscripción, los organizadores han decidido ampliar el segundo plazo reducido hasta el 15 de mayo.

En estos días estamos cerrando ya el programa del encuentro, con un alto contenido cultural, turístico y de entretenimiento, y con actividades durante los días anteriores y posteriores.

Puede verse la información en <http://www.esperanto.es/congreso>.  
Para inscribirse:  
<http://www.esperanto.es/kongresaligo>

## AMPLEKSIGITA LA DUA ALIĜPERIODO POR LA HISPANA KONGRESO EN TERUEL

Cento da homoj aliĝis jam al la 76 Hispana Kongreso de Esperanto (Teruel, Aragono, 23-25 junio 2017, plus antaŭ- kaj post-kongreso). Ili venas el dekduo da landoj el 4 kontinentoj. Vidu la liston ĉe: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/listo-de-aligintoj>

Por faciligi la aliĝon, kaj konsiderante la venontajn festojn, la organizantoj decidis ampleksigi la duan rabatitan periodon ĝis la 15-a de majo. Rapidu, ĉar ĝi certe montriĝos sukcesa, amika kaj amuza kiel kutime ĉe hispanaj kongresoj.

Ĉiuj informoj (inklude de kelkaj sugestoj pri loĝado), en <http://www.esperanto.es/kongreso>. Kaj por aliĝi: <http://www.esperanto.es/kongresaligo>.



### **EXPOSICIÓN Y CHARLA EN AGUILAR DE CAMPOO**

Entre el 8 y el 30 de mayo la exposición de paneles de la Federación Española de Esperanto será mostrada en la [biblioteca pública de Aguilar de Campoo](#) (norte de la provincia de Palencia).

Será inaugurada por el presidente de la asociación, José Antonio del Barrio, que impartirá una charla el día 8 a las 7 de la tarde en el salón donde se expone la muestra.

### **EKSPOZICIO KAJ PRELEGO EN AGUILAR DE CAMPOO**

Inter la 8a kaj 30a de majo la ekspozicio de paneloj de Hispana Esperanto-Federacio montriĝos en la [publika biblioteko de Aguilar de Campoo](#) (nordo de provinco Palencio, en regiono Kastilio kaj Leono).

La 8an de majo ĝin inaŭguros la prezidanto de la asocio, José Antonio del Barrio, per prelego en tiu loko je la 7-a vespere.

# XVI CUENTEANDO 2017

QUE ES GERUNDIO

Aguilar de Campoo

## PROGRAMACIÓN

**TALLER "APRENDER A CONTAR CUENTOS" CON MERCEDES HERRERO**  
PLAZAS LIMITADAS - APUNTARSE PREVIAMENTE - TRES SESIONES

26 ABRIL - DE 17 A 19:30 HORAS  
10 MAYO - DE 17 A 19:30 HORAS  
17 MAYO - DE 17 A 19:30 HORAS

**MIÉRCOLES 3 DE MAYO**  
ENTREGA DE PREMIOS DE LOS CONCURSOS DE CUENTOS, MARCAPÁGINAS, MICRORELATOS Y FOTOGRAFÍAS.

**JUEVES 4 DE MAYO**  
ANA APTEA (VIZCAYA)  
19:00 H. - PÚBLICO FAMILIAR "¡SOMOS FAMILIAS!"  
20:00 H. - ADULTOS "¡A VIDA O MUERTE!"

**VIERNES 5 DE MAYO**  
CRAIO JAULAR (ZARAGOZA)

16:00H - PÚBLICO FAMILIAR "TÚ, YO Y UN MONTÓN DE SECRETOS"  
21:00H - ADULTOS "ENTRE MUJERES ANDA EL CUENTO"

**SÁBADO 6 DE MAYO**  
CRAIO JAULAR (ZARAGOZA)

12:00H - SESIÓN DE CUENTO PARA BEBÉS "JUNTÁME CON TUS CUENTOS"  
SALDARA (CÁLABRGA)

19:00H - PÚBLICO FAMILIAR "ROBINSON Y SU LORO"  
20:00H - ADULTOS "TREINTA AÑOS, TREINTA"

**DOMINGO 7 DE MAYO**  
- TALLER DE HOMBRES A GLORIA PUENTES -  
"TANCAKE TEXTO COGNITA"

19:00H - PÚBLICO FAMILIAR. "VERGOS FRITOS Y CACHIVACHES ESTRAFALARIOS"

**LUNES 8 DE MAYO**  
19:00H - CONFERENCIA "ESPERANTO: UN PLANETA POR DESCUBRIR, UNA LENGUA PARA HACERLA"  
A CARGO DE JOSÉ ANTONIO DEL BARRIO, PRESIDENTE DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

19:30H TRADUCCIÓN DE LA EXPOSICIÓN "100 AÑOS DE L.L. ZAMENHOFF, EL HOMBRE QUE DESAFIÓ A BABEL"

**MIÉRCOLES 10 DE MAYO**  
INAUGURACIÓN EXPOSICIÓN MICRORELATOS ILUSTRADOS, FOTOGRAFÍAS, CUENTOS Y MARCAPÁGINAS

**JUEVES 11 DE MAYO**  
PRESENTACIÓN "ESPACIO BOKTOZERS" DE LA BIBLIOTECA MUNICIPAL

**VIERNES 12 DE MAYO**  
ÁLVARO GONZÁLEZ ANDRÉS (PALENCIA)

16:00H - PÚBLICO FAMILIAR "LAS MALETAS DE LOS CUENTOS"  
21:00H - ADULTOS "LA VUELTA AL MUNDO EN SEIS RELATOS"

organiza:

Con el patrocinio y colaboración de:

más información:

## EN BARCELONA

Diversas actividades se están llevando a cabo durante todo este mes en Barcelona con motivo del centenario de Zamenhof, organizadas por la [Asociación Catalana de Esperanto](#).

Desde mediados de abril a mediados de mayo, el Centro de Recursos para el Aprendizaje y la Investigación (CRAI) de la Biblioteca de Letras de la Universidad de Barcelona presenta una muestra bibliográfica, "La lengua sin amos: El esperanto cien años después de Zamenhof". Las vitrinas exteriores e interiores de la biblioteca muestran más de un centenar de documentos. Complementa la muestra una [exposición virtual](#), donde los datos biográficos del creador del esperanto se presentan en una cronología interactiva.

Además, el profesor Federico Gobbo, de las universidades de Amsterdam, Turín y Milán, impartió una conferencia con el título "¿Todavía es actual la filosofía de Zamenhof?", el 21 de abril, en el Espai Vilaweb, de Barcelona.

El día 23, con ocasión de la fiesta de Sant Jordi, la Asociación Catalana de

## EN BARCELONO

Diversaj aktivadoj estis organizitaj dum tiu ĉi monato en Barcelono, okaze de tiu datreveno, sub la gvido de [Kataluna Esperanto-Asocio](#).


La Centro de Rimedoj por la Lernado kaj la Esploro (CRAI) de la Filologia Biblioteko de la Universitato de Barcelono prezentas libro-ekspozicion, kun titolo "La lingvo sen mastroj: Esperanto cent jarojn post Zamenhof". Plenigas la eksterajn kaj internajn montroŝrankojn de la biblioteko pli ol cent dokumentoj. La ekspozicio estas vizitebla de la 14 de aprilo, tago de la centjariĝo, ĝis mezo de majo, en la enirejo de la Filologia Biblioteko de la Universitato de Barcelono. Kompletigas la ekspozicion ankaŭ [virtuala ekspozicio](#) en la kataluna lingvo kie la biografio de la iniciatoro de Esperanto estas prezentata per interaga templinio.

Krome, profesoro Federico Gobbo, de la universitatoj de Amsterdamo, Torino kaj Milano, faris [prelegon](#) "Ĉu ankoraŭ validas la filozofio de Zamenhof?", la 21an de aprilo, en la Espai Vilaweb, de Barcelono.

La 23an, okaze de la festo de Sankta Georgo (tre tradicia Festo de la Libro kaj la Rozo en Katalunio), KEA muntis informan budon en la ĉefa avenuo Ramblas de Barcelono.

Esperanto montó un puesto de información en el conocido paseo de Las Ramblas.

[Más información.](#)



## EN MADRID

También en Madrid se programaron diversas actividades en los últimos días de abril, con muy diferente carácter y público.

El viernes 21 de abril tres poetas esperantistas, Ana Manero, Jorge Camacho y Miguel Fernández, junto con dos famosos colegas que escriben en castellano, María Ángeles Maeso y Alberto García-Teresa, presentaron una tarde poética bilingüe dentro de los encuentros libertarios [JACA3](#) en el centro ocupado autogestionado EKO, en Carabanchel.

Al día siguiente, y como es tradicional dentro de la lectura ininterrumpida del Quijote en el Círculo de Bellas Artes, dos compañeros, Darío Mora y Alejandro Pareja, leyeron sendas piezas de la traducción de la obra al esperanto.

El 24 de abril, dentro del Año Zamenhof, tuvo lugar en la sede del Liceo Madrileño de Esperanto un debate sobre el tema "¿Cuál es la actualidad del pensamiento del Dr. Zamenhof?", con participación de unos 15 esperantistas que discutieron sobre sus ideas y obra, la "idea interna" del esperanto, el "homaranismon", etc. El debate fue introducido por José Antonio del Barrio, presidente de la Federación Española de Esperanto.

## EN MADRIDO

Diversas actividades se realizaron en Madrid en los últimos días de abril, en tres diferentes circunstancias y con tres públicos diferentes.

El viernes 21 de abril, tres poetas, Ana Manero, Jorge Camacho y Miguel Fernández, junto con dos famosos colegas que escriben en castellano, María Ángeles Maeso y Alberto García-Teresa, presentaron una tarde poética bilingüe dentro de los encuentros libertarios [JACA3](#) en el centro ocupado autogestionado EKO, en Carabanchel.

El sábado 22 de abril, como es tradicional dentro de la lectura ininterrumpida del Quijote en el Círculo de Bellas Artes, dos compañeros, Darío Mora y Alejandro Pareja, leyeron sendas piezas de la traducción de la obra al esperanto.

El domingo 23 de abril, en la sede del Liceo Madrileño de Esperanto, se celebró un debate sobre el tema "¿Cuál es la actualidad del pensamiento del Dr. Zamenhof?", con participación de unos 15 esperantistas que discutieron sobre sus ideas y obra, la "idea interna" del esperanto, el "homaranismon", etc. El debate fue introducido por José Antonio del Barrio, presidente de la Federación Española de Esperanto.



## EN SEVILLA

Tal como informamos en nuestro anterior Bitbulteno, el 21 de abril tuvo lugar en la Facultad de Ciencias de la Educación de la Universidad de Sevilla el curso [“Esperanto y ciencias sociales”](#), organizado por el CIADO (Comunidad de Investigación, Acción y Desarrollo para superar la Opresión) y patrocinado por el departamento de Extensión Universitaria de la Universidad de Sevilla, con colaboración de la [Asociación Sevillana de Esperanto](#).

En el mismo participó el presidente de la FEE, José Antonio del Barrio, así como los profesores sevillanos Juan Diego Díaz, Antonio Rodríguez y Vicente Manzano, organizador del encuentro. Además, durante el encuentro diversos grupos de alumnos presentaron las primeras conclusiones de sus trabajos de investigación sobre percepción del esperanto mediante encuestas realizadas en el campus, y que probablemente serán publicadas más adelante en medios académicos.

El presidente de la Federación tuvo también la ocasión de visitar el curso de esperanto organizado por la asociación local y para cenar con miembros de ésta el día anterior.

## EN SEVILO

Kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, la 21an de aprilo disvolviĝis en la la Fakultato pri Edukado de la Universitato de Sevillo la kurso [“Esperanto kaj sociaj sciencoj”](#), organizita de komunuma grupo por aktivado, kun apogo de universitataj departementoj kaj la kunlaboro de la [Sevila Asocio de Esperanto](#).

Prelegojn kaj atelierojn gvidis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj la sevilaj instruistoj kaj profesoroj Juan Diego Díaz, Antonio Rodríguez kaj Vicente Manzano, organizanto de la renkonto. Krome, dum ĝi diversaj grupoj prezentis la unuajn konkludojn de la esploraj laboroj pri percepto de Esperanto per enketoj faritaj en la Universitato, kaj kiuj probable estos poste publikigataj en akademias mediaj.

La prezidanto de HEF havis ankaŭ la ŝancon dum la antaŭa tago viziti la kurson de Esperanto organizitan de la loka grupo kaj kunvespermanĝi kun ties anoj.



## EN VALENCIA

Del 26 de abril al 7 de mayo, en el Teatro Micalet de Valencia, se está representando la obra de teatro [“Els esperantistes”](#). La obra, escrita por Paco Zarzoso y protagonizada por Josep Manel Casany, Ferran Gadea y Cristina Garcia, utiliza el esperanto y la cultura esperantista para [hablar de la fragilidad humana](#).

La compañía ha recibido asesoramiento de la Asociación Valenciana de Esperanto, y, entre otros motivos, utiliza una traducción de la conocida canción [“Libre”](#), adaptada al esperanto por Liven Dek.

También en Valencia, el 29 de abril, con ocasión de un encuentro de Escuelas Oficiales de Idiomas, se celebrará el Festival ['MuLTiLiNGuS'](#), un concierto con canciones populares en numerosas lenguas, incluyendo alemán, inglés, japonés, francés, ruso, italiano, rumano, árabe, portugués, euskera, gallego, valenciano, español y esperanto. De la lengua internacional, además del euskera, se encargará nuestro compañero Garikoitz Knörr.

## EN VALENCIO

Inter la 26a de aprilo ĝis la 7a de majo, en la Teatro Micalet de Valencio, reprezentiĝas la verko [“Els esperantistes”](#) (“La esperantistoj” en la valencia lingvo). La teatraĵo, verkita de Paco Zarzoso kaj ludata de konataj aktoroj Josep Manel Casany, Ferran Gadea kaj Cristina Garcia, utiligas Esperanton kaj la esperantistan kulturon por paroli pri la [homa fragileco](#).

La kompanio ricevis konsiladon de la Valencia Esperanto-Asocio, kaj, inter aliaj eroj, utiligas adapton de la konata hispana kanto [“Libre”](#), tradukita al Esperanto fare de Liven Dek.

Ankaŭ en Valencio, la 29an de aprilo, okaze de oficiala renkonto de Oficialaj Lingvolernejoj, oni programis [muzikan festivalon](#) 'MuLTiLiNGuS', t.e. koncerton kun popolaj kantoj en nombraj lingvoj, inklude de la germana, angla, japana, franca, rusa, itala, rumana, araba, portugala, eŭska, galega, valencia, hispana kaj Esperanto. Pri la internacia lingvo, krom la eŭska, zorgos nia kolego Garikoitz Knörr.



## ÉXITO DE AMIKUMU

En muy pocos días tras su lanzamiento, la aplicación [Amikumu](#) ha tenido un éxito fulminante. Esta “app” para dispositivos móviles permite encontrar gente cercana con quien hablar cualquier lengua, pero por el momento se ha lanzado sólo para hablantes de esperanto.

En unos pocos días se han alcanzado ya unos tres mil usuarios. Teniendo en cuenta el número de personas accesibles desde el centro de la Península Ibérica, se calculan más de 100 esperantistas en este ámbito geográfico.

Cualquier usuario de dispositivos móviles puede descargarse la

## SUKCESO DE AMIKUMU

Post tre malmultaj tagoj, la aplikaĵo [Amikumu](#) atingis fulman sukceson.

Tiu ĉi apo por saĝtelefonoj ebligas trovi parolantojn de ajna lingvo, sed ĝis nun nur lanĉiĝis por esperantoparolantoj.

Post nur kvar tagoj, registriĝis pli ol tri mil uzuloj. Konsiderante la nombron da alireblaj homoj el la centro de la Iberia Duoninsulo, oni povas kalkuli jam pli ol 100 esperantistojn en tiu ĉi geografia medio.

La aplikaĵo estas libere elŝutebla, kaj jam ebligis la interkonekton de esperantistoj kiuj troviĝis sufiĉe proksime, kaj ne konis unu la alian. Oni atendas grandan sukceson kaj multajn bonajn surprizojn.

aplicación de forma gratuita, y explorar la presencia de otros esperantistas en las inmediaciones.

